2.ª JARO N.º 20 KAJ 21 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 SEPTEMBRO 1937

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)




## KONKURENCO INTER LUPOJ

La hispana popolo ne bezonis multan tempon por malkovri la rubon de la malica politiko de S-ro. Eden, kiu fakte estas plia malamiko al niaj pezaj klopodoj por digno k libero. Nia plej alta historia merito estas ke la hispana Respubliko batalas kontraŭ tri nacioj, kiuj rekte gvidas la internan ribelon kun la hipokrita apogo de la internacia diplomataro, kiu, sub ruza preteksto limigi la konflikton k gardi la pacon, teksis kanajle specialan sistemon de sufoko kontraŭ la legitima Registaro.

Kion pretendas Britio? la respondo estas rapida: konkurenci kun la faŝistaj ŝtatoj pri la posedo de Hispaniol Jes, la vero—tragedia vero por nia brava k oferema popolo—estas ke la angla konservativa registaro nur havas nun neskueblan celon: forpeli el la rondo de Franko la germanojn k italojn anstataŭonte ilin!! Kontroli perfidon povas esti negoco...

Nur unu granda k potenca popolo, Sovetio, klare komprenis la ludon; alia granda nacio, Francio, heziteme akceptas la manovron kredante, ke la angla influo estas malpli danĝera, apud la Pirineoj, ol tiu de hokokruco sen vualoj. La cedo pri militrajto al Franko estas la kerno de la manovro. Anglio ĵonglas per la kondiĉo pri foriro de la volontuloj ĉar tio signifus la finon de la itala-germana influo. Tiam la angla imperialismo pretiĝus akiri gajnon el tia situacio k sendube ĝi protektus la grupon, kiu plej facilanime restus ŝafe obeema al ĝiaj interesoj. Tiuokaze certe ĝi protektus la bandon de «patriotaj» perfiduloj, kiuj kapablas vendi sian patrion k ĉion vendeblan.

Ĉar tiuj intrigoj k komplotoj inter lupoj ne estas tiel glataj, kiel oni povas imagi, la farso enue k tragike plilongiĝas semajnon post semajno. Evidentiĝas. ke Anglio ne deziras rapidan solvon ĝis kiam la tereno estos bone preparita al tiuj abomenaj intencoj.

Tiu monstra koncepto de la diplomata politiko nur trovas barojn en la obstina volo de la hispana popolo preta venki honeste aŭ digne perei. Tial, ankaŭ en eksterlando, nur la energia sinteno de ĉiuj popoloj devigos mediton al anglaj politikistoj. Laŭ ekskluzive hispana vidpunkto, la militrajto al faŝista perfido estas nenio nova. Ĉu la ribelintoj ne ĝuas fakte tiun komplezon ekde la komenco? Ĉu ili ne dronigas senpune ŝipojn protektatajn de brita k alinaciaj flagoj? Tiu hontinda panoramo estas nur la ekstera aspekto de la surda konkurenco inter maljunaj k junaj lupoj, kiujn la diversaj branĉoj el sana popolo devas scii same malkovri k ĉiel ajn venkobati por povi marŝi libere sur larĝa ŝoseo de vera Demokratio.

Hispanio deĵoras nun en sia posteno. Sen paŭzo en la lukto ĝi konstatas la aperon de nova malamiko internacia sub la kapitalista ombro de la Borso de Londono! En lupa konkurenco, estas moko la famo pri kavarilecol

## DANKA BABILADO

La realo, plej ofte, estas bato por la fantazio. En la esceptaj fojoj, kiam okazas la malo, supera ĝojo sprucas sen mezuro. Tiun agrablan emocion ni ĝuadis dum la rapidaj tagoj de nia vizito al ekstero por travivi la debatojn de du laboristaj Kongresoj. Dornoj el fanatika malico ne vundas tra la veluro el ĝusta konscio! Maturaj fruktoj, de komprenemo k simpatio al popolfrontismo, estis milda regalo por nia instrua pilgrimo de urbo al urbo, de hejmo al hejmo...

Ni, ĉiam pretaj al tuja polemiko, eble iomete tro rigoraj antaŭ erara riproĉo aŭ senfundamenta atako, konfesas honeste nian nulan kapablon por esprimi laŭdojn k laŭtigi dankojn. La intimaj sinceraj sentoj pri amo, danko k admiro, riskas aperi kiel mallertaj balbutoj se ili forlasas la delikatajn k misterajn ĉelojn de la homa konscienco.

La plej simbola babilado, pri nia eterna danko, estus do konservi blanka la angulon de ĉi tiu rubriko. Tamen, argilo iam povas esti ŝelo de juvelo. Ĉiuj niaj bonaj geamikoj, el la kongresaj amasoj, kuraĝaj kunlaborantoj k zorgemaj gastigantoj, legante ĉi liniojn, devas akcepti k gardi nur la vortojn, kiuj restas virge ne diritaj, kvazaŭ rezervo de forto neelĉerpebla por la nobla k alta tasko de nia popola entrepreno.

En speciala kunsido, kiu dense ŝtopis grandan ĉambron de kafejo, ni aŭdis sugestojn, rimarkojn k tre interesajn kritikojn. En agrabla medio ni ĉiuj studis, tre serioze, la pozitivajn flankojn de kelkaj riproĉetoj k plendoj. La legantaro demokrate skizis vojon, kiun plezure ni akceptis por utile varti nian karan infanon, kiu ne hazarde fariĝis komuna banto, koincida punkto, por jam pli ol kvin miloj da esperantistoj, el tre malsamaj tendencoj sed ĉiuj klare akceptintaj, sen rezervoj, la rektan lukton kontraŭ la Faŝismo por savi la homan dignon, por savi la kulturon, por savi precize Esperanton mem!

La popolo estas motoro, jen firma konvinko nia kies definitivan trajton ni konfirmis, kun ĝojo, dum longa pilgrimado de kunsido al kunsido, de hejmo al hejmo, tra la bruo de la stratoj, el plej diversaj urboj ĝuantaj pacan trafikon sen terura zorgo pri milito.

## En malproksima Oriento, la sama drako vomas detruon sur pacon de antikva popolo!

Japanio aplikas en Ĉinio la abomenajn metodojn de l' Faŝismo. Se en la mondo ne jam plu ekzistas juro k leĝo, almenaŭ restas ankoraŭ popoloj tute pretaj batali por detrui ungojn de friponoj k hontigi pasivecon de filistroj. Fratoj de Ĉinio, per sama heroeco k sankta fervoro ni nin helpas reciproke! Antaŭen, spite ĉion!

"C. N. T." ĉiutaga ĵurnalo, organo de la Nacia Konfederacio de Laboro en Madrido, mallaŭdas la novan politikon de P. O. U. M. kiu agitas nun denove por Laborista Revolucia Fronto.

La konfederacia gazeto diras: «La kamaradoj el P. O. U. M. ne devas lasi sin misorientiĝi per la konsiloj de tiuj, kiuj ne travivas nian revolucion nek per sia nuna animstato. Kun la demagogio oni iras nenien! La Antifaŝista Fronto devas esti nepre defendata de ĉiuj, kiuj vere volas venki en la milito k firmiĝi, en la ariergardo, la necesajn kondiĉojn por marŝi poste, per sekuraj paŝoj, tra la vojo de sociaj k politikaj progresoj.»

La anarkistoj de C. N. T. koincidas do kun la objektiva kritiko de nia bulteno pri sinteno de P. O. U. M. Ankaŭ estas trafa la aludo pri la konsideroj de tiuj, kiuj ne rekte travivas la hispanajn aferojn.

# NOTOJ PRI LA INTERNA POLITIKO

● La Interliga Komitato de la partioj Komunista k Socialista ĵus publikigis la bazojn por komuna agado de ambaŭ organizoj. La interkonsento tuŝas jenajn konkretajn punktojn: «plifortigo de la potenco al la Popola Armeo. Akceli la kreadon de vigla militindustrio. Aktiva agado pri organizo de la fortikigaj laboroj. Kontribui intense al perfekta organizado de la Transporto. Ordigi k plani la nacian ekonomion. Tendenco al amikaj rilatoj kun la etburĝaro. Rigora ordo en la tuta lojala zono. Sindikata unueco inter U. G. T. k C. N. T. Junulara unueco. Internacia unueco. Lojala konduto kun Sovetio.

Tio signifas gravan paŝon antaŭen en la vojo al la efektiva unueco de la du branĉoj de l'Marksismo, kio certe influos efike por plifortigi la potencon de la proletaro kiel akso plej firma de la milito.

● La Konsilantaro de Aragono, institucio, kiu kaŭzis, kaŭzas k kaŭzos ankoraŭ longtempe grandan diskutadon inter ĝiaj kreantoj k ĝiaj atakantoj, ĵus estis forigata de la registaro, ne perforte ĉar ĝi mem akceptis sian likvidon, laŭ sukcesanta plano de la registaro. Ni ne volas ĉi tie hodiaŭ fari kritikon pri ĝia tuta bazo k funkciado, ni nur mencias, ke tiu speco de regiona provizora registaro tre doktrinece, laŭ inspiro de tendenco, agadis k ne sciis ligi al sia politiko la aragonan kamparanaron ĝis tia akstremo, ke multaj vilaĝanoj pro la perfortigaj procedoj de la regantoj, forkuris al la faŝista teritorio. La novaj metodoj estas bona garantio!

● La registaro ĵus malpermesis publikigi atakojn kontraŭ Sovetio. La koncerna Ministro deklaris, ke atakoj al tiu lando, kiu amike rilatiĝas kun Hispanio estas tute maljustaj k ne plu estos permesataj.


Tiu decido de nia registaro estas aplaŭdata de ĉiu honesta antifaŝisto hispana, kiu konscias pri la valora helpo, kiun ni ŝuldas al Sovetio, enmeze de la senagado de aliaj «demokrataj» potencoj, kiuj fordonas malavare sian dignon al la faŝistaj regnestroj.

● La C. N. T. vizitis la Prezidanton de la Respubliko antaŭ kelkaj tagoj. K-do. Antona, elstara membro de la organizo deklaris pere de la ĵurnaloj: «Ni estas ekzamenintaj la militan situación k la politikajn cirkonstancojn kontraŭ la ribeluloj k kontraŭ la invadintoj. En kunsido de regionaj komitatoj de C. N. T. ni prenis unuanime la decidon, ree oferti la helpon k kunlaboron, per niaj propraj elementoj, al la Registaro de la Respubliko, ĉar ni kredas, ke estas nepra devo, en ĉi tiuj momentoj, firme apogi tion, kion la registaro reprezentas k partopreni la gvidadon kun la programo gajni la militon k kanaligi la revolucion, laŭ vojo konvena por la nacia ekonomio. Ni restis tre kontentaj je la vizito farita al la Prezidanto, kiu atente aŭskultis niajn proponojn.»

● La mistera malapero de Nin, gvidanto de P. O. U. M. elvokis ekscitan animstaton inter tiuj, kiuj akuzas certajn elementojn, esti la aŭtoroj de tiu stranga okazaĵo k tiuj, kiuj proklamas, ke Nin estas kulpulo k tial li savis sin el certa puno per forkuro, protektite de faŝistemaj helpantoj, kiuj kaŝe agadas inter ni. Kompreneble, la disputo estiĝis inter P. O. U. M.-anoj k komunistoj.

La socialista gazeto de Valencio, pritraktante la aferon diris, ke Nin estas kulpigata en la proceso, kiun la tribunalo sekvas kontraŭ li, pri tre konkretaj deliktoj, kiuj preskaŭ certe rezultigus al li iun severan verdikton, tial ŝajnas malvere, ke la komunistoj povu deziri aŭ okazigi lian malaperon. Kompreneble, se la komunistoj celus senigi sin de tia persono, nun estis bela okazo por nuligi tiun malamikon per tute leĝaj procedoj. Tamen, se Nin kulpas, al neniu pli ol al li mem interesus eskapi el la puno, kiun li meritis. Sekve, al tiuj, kiuj akuzas la komunistojn, oni povas argumenti, ke la tuta afero povas esti ankaŭ kolosa manovro kontraŭ la komunistoj, per kiu samtempe Nin evitis al si gravan komdamnon. Tion diras la fidinda socialista ĵurnalo.

# KIAM VIA OFENSIVO, KAMARADOJ?



Unika falĉisto por tranĉi la lolon

La ofensivo de la italaj divizioj, kun centoj da kanonoj k tankoj, helpe de amaso da germanaj aviadiloj, sukcesis, post barbara detruado de la ĉirkaŭaĵoj, kiel en Bilbao, kapti Santander. Laŭ la gazeto *Tribuna* de Romo, dekdu italaj generaloj partoprenis k gvidis la konkeron de tiu norda regiono. Samtempe la militŝipoj k submarenoj de Italio senĝene kaperas tra la Mediteraneo ĝis la Dardaneloj por tie dronigi senpune niajn ŝarĝŝipojn. La ribelintoj tiel povas fieri pri *sia* eskadro... pri la pirata eskadro de Mussolini kun fripona toleremo.

Tiu skandalo okazas antaŭ la splena indiferento de la Diplomatio. Ŝajnas, ke en la proksima kunsido de la naŭziga Ligo de Nacioj oni pretendas argumenti per venkoj. Ju pli da militaj sukcesoj oni povos montri des pli da avantaĝoj oni povos eltiri. Ne gravas tio, per kia helpo la hispanaj perfiduloj sukcesas flirtigi sian flagon. Pravo ne valoras. Justo ne pezas. Honesteco ne taŭgas.

Ni perdis la fidon al la farsaj tribunaloj de la potenculoj, al la ekspluatantoj de la mondo. Sed ni obstine volas ankoraŭ fidi al la popoloj, kiuj ne ŝatas suferi nian sorton. Ĉu ili fine vekiĝos aŭ akceptos ĝin kiel fatalon? Nia espero je la konscio de la tutmonda proletaro komencas malvigliĝi. Simpatio ne sufiĉas, kamaradoj! Vian solidaron montru per pli efika gesto ol per kompata sendado de litoj k medikamentoj. Se vi ne kapablas eluzi vian forton nunmomente, kiam vi juĝos oportune interveni favore al la laboristoj de Hispanio? aŭ, ĉu vi pensas, ke la rezulto de nia batalo ne efikos kontraŭ vi mem se ni malvenkas? Kontrolu la sintenon de viaj sindikataj k partiaj gvidantoj; postulu al ili faktajn k konkretajn agojn! Nia Armeo ĵus komencis kuraĝan ofensivon en la frontoj de Aragono. Al la fremda atakego en la Nordo ni respondas per iberia impeto ĉe orienta regiono en direkto al Zaragozo.

Ne nur por ni, por vi ankaŭ ni batalas. Nia k via sorto dependas ankaŭ de tio, ke vi kunbatalu. Estu agemaj! Konsciu pri via forto k agu konsekvence. Nur vi povas haltigi la paŝojn de nia komuna malamiko! La striko ankoraŭ estas proleta k grava ofensivo!

## REMEMBER!

Sur monteto staras nia parapeto. Antaŭ ni etendiĝas vasta regiono, ĉe kies fundo leviĝas blua montaro. Ĉiuvespere ni rave rigardadas la sunon, malaperanta trans tiuj montoj. Neniam k nenie ni havis ŝancon vidi tiajn ĉarmajn k riĉnuancajn sunsubirojn. La spektaklo estas ja longa k ĉiutage malsama. Dum pli ol unu horo la ĉielo, nebuloj k montoj ornamiĝas per diversaj koloroj, k ĉio okazas tiel bele k tiel simple...

Dise, tie k tie, sur la konkerenda regiono vidiĝas kelkaj vilaĝoj k la urbo Jaca (Ĥaka). El malproksime aspektas gaje tiuj vilaĝoj, sed ne tiel estas en la realo. Ili suferas ankoraŭ la premon de l'reakcio, ili ĝemas sub la boto de l' militisma faŝismo. Kaj tamen, sur tiuj kampoj, nun orkoloraj, okazis antaŭ 7. jaroj la unua epizodo de nia civil-milito, aŭdiĝis tie la unuaj kanontondroj k pluraj homoj oferis tie sian vivon al popolaj idealoj.

Decembro de jaro 1930. Agoniis la diboĉanta monarkio; la groteska diktaturo de generalo Primo de Rivera restis senpova por sufoki la popolan malkontenton. La nepra, neevitebla eksplodo okazis. En urbo Jaca, apud Pirenea montaro, du bravaj k noblaj oficiroj leviĝis, kiel interpretantoj de l' popola volo. Galan k Garcia Hernandez starigis la Hispanan Respublikon k pretiĝis defendi ĝin kun armiloj en manoj. Freŝa vento de libero blovis unuafoje tra tiuj valoj. Bedaŭrinde, tiu romantika gesto ne eĥis en la cetera Hispanio k la despota monstro povis ankoraŭ, per siaj lastaj konvulsioj, dronigi en sango la sindoneman aventuron. Sed ne vane estis verŝita la sango de tiuj herooj. Ilia nobla ofero akcelis la pereon de l' jam putrinta sistemo, k nur post kvar monatoj la hispana popolo ĝoje salutis la aperon de nova aŭroro.

Nun la Tiranio, kiel nova Fenikso, revivis el sia propra cindro, k la urbo k la kampoj suferas ĝian venĝon.

Sed solenan promeson ni faris k ĉiutage ni rememoras pri ĝi. Ni reliberigos tiun karan hispanan terpecon k, antaŭ la tombo de l' tiamaj falintoj, honore al ili k honore al sennombraj pereintoj pro popola libero, ni pie kantados: «Viktime vi falis en kruda batal' pro am' al popol' en sindono...»

I. O.

(Nord-Aragona Fronto)

# NIA POZICIO

Kelkaj—tre malmultaj—legantoj de POPOLA FRONTO subite dubetas pri nia rolo k celo. Eĉ unu kamarado skribas al ni dirante, ke ni jam malkovris nian «ĝis nun kaŝitan komunisman karakteron». Aliaj amikoj sin turnas al ni k diras, ke ĉar verŝajne la hispanoj batalas por demokrateca Respubliko, k tio ne gravas por la proletaro, ili ne plu povas nek volas apogi nian lukton.

Se tiuj plendemaj personoj ne kapablas distingi diferencon inter demokratio k faŝismo; k pro tio ilia entuziasmo malvigliĝas, ni dankas, ke ili forlasu sian subtenon al nia batalo ĉar ni ne ŝatas apogon sub la pezo de certaj kondiĉoj. Kiel multfoje frape dirite, sur la amboso de nia gazeto, la hispanoj batalas: unue por venki la faŝismon, nepra premiso por konstrui novan sociordon, k due por starigi, post la venko, reĝimon sen maljustaj privilegioj, en kiu Demokratio ne plu estos vana vorto sed aŭtentika bazo de la socio.

Tamen, menciinde estas, ke la kamaradoj, kiuj malakceptas la direkton, kiun ni sekvas, ne loĝas en faŝistaj landoj. Se estus tiel, kredeble ili havus alian opinion. Kun surprizo ni rigardas la riproĉojn k miras pro tio, ke ankoraŭ estas bezonataj klarigoj pri nia starpunkto.

Popolfronto estas kunligo—ne kunfandiĝo—de laboristaj k proletaj partioj kun politikaj sektoroj de liberalaj etburĝoj, kiujn ne timigas la socialaj progresoj k konkeroj de la ekspluatata klaso sed male, ili estas pretaj helpi ĝian disvolviĝon al plej alta ŝtupo. En Hispanio, intelektuloj k mezklasanoj kun proletema menso ja abundas feliĉe. Niaj respublikanoj, ĝenerale en sia plimulto, estis ĉiam k restas socialistemaj k tial la Hispana Popolfronto konsistigas fortan unuecan blokon, sen profundaj diverĝoj; tiun politikon ni subtenas per nia gazeto, klare k honeste. Se ni estus ortodoksaj komunistoj, sen honto nek vanto, ni konfesus tion sincere. Sed POPOLA FRONTO estas simple... Popola Fronto k nenio alia. Ne cerbumu niaj amikoj pri la celo de nia gazeto fekunde pluganta tra la verda kampo de la esperantismo.

La laboristaro atentu la historiajn faktojn k observu fenomenon. Demokratio estis ĝis nun la plej forta apogilo por la subpremanta klaso. Per ĝi, trompe ĝi regis por sia profito k defendis siajn proprajn interesojn. Sed malgraŭ tio, ke ĝi estis fikcio, la laboristoj uzante la voĉdonrajton k organiziĝinte, solidare k konscie, efike profitis je la Demokratio por subfosi la povon de la privilegiuloj k atingi sinsekve avantaĝojn k plibonigojn.

Kaj jen, tiam la reakciularo vidas, ke eĉ parodio de Demokratio estas danĝera por ĝia potenco. La laboristoj utiligante lerte siajn fortojn povas fakte influadi k akiri leĝe la plenan povon. Komenciĝas do ofensivo kontraŭ la Demokratio, fare de la timemaj reakciuloj k naskiĝas la Faŝismo, kiu kovras sian vizaĝon per la emfaza masko de «defendo de kulturo k civilizo».

Ne ekzistas en Hispanio iu organizo, partia aŭ sindikata, sufiĉe forta por starigi trude sian programon aŭ sian diktatorecon. Nek ĝi estus solvo por la popolo. Ni antaŭvidas por nia lando reĝimon, kiel rezulton de reciprokaj cedoj k de interakordiĝo de ĉiuj sektoroj antifaŝistaj.

Tute senbaza estas la kalumnio pri persekutado pro pensoj k ideoj. La popola justeco punas k enkarcerigas nur malamikojn, kiuj ofte kaŝas sian fuŝan varon per tre respektindaj nomoj. En okazo de sangaj kolizioj, falis bonaj kamaradoj de ĈIUJ tendencoj, kiuj erare svingis armilojn, por disputi, anstataŭ uzi ilin kontraŭ la komuna malamiko, kiu certe ne estas fremda al tiu lukto interfrata k sciis ruze provoki ĝin. Tiuj incidentoj okazigis viktimojn el ĈIUJ organizoj. Sed la registaro supertendence devas interveni kontraŭ kelkaj grupetoj aŭ personoj, kiuj pretendas agadi perforte kun damaĝo por la popola unueco kontraŭ la faŝismo. La popolo batalas kontraŭ diktatoreco, kontraŭ ajna absolutismo k rifuzas la jugon, kun bombasta brilo, de minoritoj aŭ de individuoj, kiuj volas regi feŭde sur la vilaĝanoj, timigitaj per proceduj de teroro. Ne estas oro ĉio, kio brilas; nek estas revolucianoj ĉiuj, kiuj pri sia revoluciemo fanfaronas k gaje diboĉas detruante la ekonomion per absurdaj aŭ senpripensaj ludoj. Respondecaj organizoj proletaj ne subtenas senkontrolajn agojn de egoistaj izoluloj aŭ de aŭtonomiaj grupoj, kiuj ne meditas la sekvojn de sia agado. Tial neniu serioza laborista organizo suferas persekuton aŭ ĝenon de la registaro, sed ili ĝuas normalan vivon k ekzistorajton. La popolanoj luktas k mortas en la frontoj por la libero, ne por anstataŭigi siajn malnovajn mastrojn per aliaj, kiuj sen pravo volas ekzerci la forton.

Fine, pri nia gazeto ni aldonu, ke ni estas plene k fiere sendependaj. Ni havas nenian subvencion de la Ŝtato, ankaŭ ne de partio aŭ sindikato. Ni vivas k floras dank' al la monhelpo de niaj legantoj ekskluzive, k ni fieras pri tio. POPOLA FRONTO ne estas komunista sed ankaŭ ne, ho kompreneblel antikomunista, nek anarkista nek antianarkista. Nia klasbatalo estas sufiĉe milda por akcepti plaĉe k danke la favoron de multaj liberalaj neŭtraluloj, kiuj per silenta laboro helpas pli praktike la epopeon de Hispanio ol tiuj, feliĉe malmultaj, kiuj malŝatas nian taskon se ĝi ne reflektas la kolorojn de iliaj subjektivaj vitroj! Nia sendogmemo estas perfekta. Nia gazeto estas popolfronta k tiel ĝi estos tre obstine, kontraŭ la faŝismo, ĝis venko aŭ pereo.

# AGRABLA DISREVIĜO DE KAPTITA KAPITANO

Dum la lastaj sukcesoj de nia Armeo en la Centra batalfronto, inter multaj kaptitoj, troviĝis artileria kapitano kun aliaj oficiroj. Li diris: —Ĉu eblas? Mi nur vidas hispanojn tie ĉi... Kie estas la rusoj k la francoj, kiuj gvidas la ruĝulojn?

Kaj kiam oni respondis al li, ke niaj ĉefoj k oficiroj estas filoj de Hispanio, li aldiris: —Tamen, en nia kampo oni asertas la malon. Kaj ni ĉiuj estas konvinkitaj pri tio. Nun mi vidas, ke oni trompas nin k ke mi batalis, ne kontraŭ fremduloj kiel mi kredis, sed kontraŭ samlandanoj.

* * *

Tiu kapitano, viro kun kariero, kredis sen pridubo la fabelojn absurdajn de la oficialaj komunikoj de Franko. Tiel li konsolis sin, vidante la germanojn k la italojn, svarmantaj en la «frankistaj» vicoj, ĉar li supozis, ke en la lojalaj trupoj abundis ankaŭ la eksterlandanoj. Se tion pensis iu kapitano, kion pensos do la simplaj soldatoj, la malkleraj kamparanoj k la mezmensa loĝantaro de la ariergardo? La mensogado, la falsaĵoj kreis medion, en kiu dronas la logiko, la racio k la vero profite al perfido.

De antaŭ unu jaro, duono de Hispanio havas nenian scion pri la aŭtentikaj faktoj. La tiranio reganta sur tiu teritorio, kaŝas zorge la veron. Por pravigi siajn krimojn, la faŝistoj akuzas la registaranojn pri teruraj murdoj. Por pravigi la ekziston de germanaj k italaj regimentoj en sia zono, ili asertas ke ĉe ni abundas la francaj batalionoj. Ne strange do, ke miloj k miloj da personoj sub la regado de Franko, rifuzis finlaste cerbumi k formi al si konkretan opinion pri la vera situacio. Ja la pesimismo kreskas, la malkontento pliiĝas, la flustroj laŭtiĝas... Sed tio okazas sendepende de la realo pri la milito, kiu estas vualita per blindiga tukego.

* * *

Nel Ĉiuj devas koni la veron. En la respublikana Hispanio, krom la nekontesteblaj volontuloj, kies memvolan aliĝon neniu povas diskuti, kiuj venis entuziasme pelitaj de Idealo, spite barojn k malfacilaĵojn sennombrajn, nur batalas sur nia tero homoj, kiuj naskiĝis en nia lando k parolas nian lingvon. Ne ekzistas sur nia teritorio generaloj, kiel von Faupel k Mancini, specialaj senditoj de fremdaj ŝtatestroj. Nur la senhonoraj ribeluloj povas akcepti tiajn mastrojn, sen kiuj ili estus jam de longe venkitaj senrimede de la plenrajta forto de sia propra popolo, de la viva Hispanio!




Niaj fervoraj amikoj el Hago estas bravaj pioniroj de novaj metodoj por praktika apliko de niaj devizoj pri rekta alpaŝo de la popolo en ĉiuj aspektoj de la urĝa antifaŝista batalo. Krom eldono de nia gazeto en nederlanda lingvo, ili ankaŭ pretigis ekspozician fenestron, kiu loge k arte altiras ĉies atenton kiel bone montras la apuda bildo.

## MAHOMETANA DIBOĈA FESTENO

La tuta mondo konas, jam de longe, la procedojn per kiuj la bando da perfidaj ribelintaj generaloj logis la maŭrojn al la infero de la milito en Hispanio. Oni promesis al ili altan salajron, abundan nutraĵon, teron por kulturi ĝin post la venko k, kiel militakiraĵojn, ĉion, kion ili sukcesus rabi en la konkerotaj vilaĝoj.

Ankoraŭ pli. Ilia voluptema temperamento estis ruze vekata per aludoj al la virinoj de nia lando k oni rajtigis la marokanojn por satigi sian malĉastan apetiton sur la malfeliĉulinojn, kiujn ili trafus. Jes, eĉ tiu monstraĵo estis promesita al la maŭroj, por altiri ilin, de la senhontaj armeaĉanoj, kiuj nepre bezonis tiujn hordojn, kiel helpon por starigi la regnon de Dio.

La afrikanoj do, forrabis senbremse vilaĝojn k urbetojn en Ekstremaduro, Andaluzio, Kastiljo, Aragono k Baskio, murdante sendefendajn popolanojn por alproprigi al si kudromaŝinojn, matracojn, vestojn, juvelojn k meblojn. Ĉion ili vendis en la placoj de la vilaĝoj, kun la komplezemo malkuraĝa de la mallojalaj militistoj.

Post la rabado k murdado, la maŭraro dediĉis sin ofendi la virinojn. Tiel okazis en multaj urboj k eĉ en Zaragozo. La faŝistaj radiostacioj dementis tiujn terurajn krimojn k celis kaŝi la hontigan konduton de la oficiroj, kiuj rigardis tion sen ruĝo de honto.

Malfacile estos nun al ili, dementi la barbaran spektaklon, kiu estiĝis en Vitoria, pia urbo plena je monaĥejoj, preĝejoj k loĝata de kristanaj familioj. Personoj ideologie dekstremaj, kiuj forlasis la urbon Vitoria, komunikas la farojn de tiuj barbaroj aĉe agantaj senĝene antaŭ la hispanaj banditoj.

Alvenis tien la maŭraj hordaĉoj, ebriaj je sango, sataj je akiraĵoj, k regataj de freneziga malĉastemo. Tiuj sovaĝaj bestoj, kiujn neniu bremsis, disiĝis tra la urbo k en la ĉirkaŭaĵoj profanis la tremantan k puran honestecon de centoj da virinoj hispanaj. Tiun, kiu rezistis al perfortigo, ili mortigis. La viroj, kiuj volis defendi la virton de fratino, filino, edzino aŭ patrino, falis, traborite de klugoj, sub la facila akuzo je «ruĝulo».

Nun, post monatoj, tiu monstra krimo, tolerata de aŭtoritatoj sin nomantaj hispanaj k kristanaj, fruktiĝas kiel malbeno k hontindaĵo. Jam dek unu el tiuj knabinoj, perfortigitaj sen la protekto de la hundaĉoj de «Supren Hispanio», akuŝis nigrajn idojn, kiel ateston nekontesteblan pri tio, kiaj estas la naskintoj. Pli ol kvindek virinoj baldaŭ akuŝos siavice k ĉiu el ili scias, ke baraktas en sia ventro la frukto de tiu maroka aĉularo, kiun Franko k liaj kunuloj venigis en Hispanion, por masakri niajn infanojn k malvirgigi niajn virinojn.

Kiam ne eblos nei la faktojn, tiu hundo naŭziga, kiun la Papo ĵus agnoskis, Franko, diros, ke ĉio estis tolerata por plifortigi la solidarecajn ligilojn kun siaj aliancanoj de Afriko... je nomo de la kristana familio!

**Esperanto estas, krom instrumento de kulturo, advokato de popoloj!**

# AGRABLA DISREVIĜO DE KAPTITA KAPITANO

Dum la lastaj sukcesoj de nia Armeo en la Centra batalfronto, inter multaj kaptitoj, troviĝis artileria kapitano kun aliaj oficiroj. Li diris: —Ĉu eblas? Mi nur vidas hispanojn tie ĉi... Kie estas la rusoj k la francoj, kiuj gvidas la ruĝulojn?

Kaj kiam oni respondis al li, ke niaj ĉefoj k oficiroj estas filoj de Hispanio, li aldiris: —Tamen, en nia kampo oni asertas la malon. Kaj ni ĉiuj estas konvinkitaj pri tio. Nun mi vidas, ke oni trompas nin k ke mi batalis, ne kontraŭ fremduloj kiel mi kredis, sed kontraŭ samlandanoj.


* * *

Tiu kapitano, viro kun kariero, kredis sen pridubo la fabelojn absurdajn de la oficialaj komunikoj de Franko. Tiel li konsolis sin, vidante la germanojn k la italojn, svarmantaj en la «frankistaj» vicoj, ĉar li supozis, ke en la lojalaj trupoj abundis ankaŭ la eksterlandanoj. Se tion pensis iu kapitano, kion pensos do la simplaj soldatoj, la malkleraj kamparanoj k la mezmensa loĝantaro de la ariergardo? La mensogado, la falsaĵoj kreis medion, en kiu dronas la logiko, la racio k la vero profite al perfido.

De antaŭ unu jaro, duono de Hispanio havas nenian scion pri la aŭtentikaj faktoj. La tiranio reganta sur tiu teritorio, kaŝas zorge la veron. Por pravigi siajn krimojn, la faŝistoj akuzas la registaranojn pri teruraj murdoj. Por pravigi la ekziston de germanaj k italaj regimentoj en sia zono, ili asertas ke ĉe ni abundas la francaj batalionoj. Ne strange do, ke miloj k miloj da personoj sub la regado de Franko, rifuzis finlaste cerbumi k formi al si konkretan opinion pri la vera situacio. Ja la pesimismo kreskas, la malkontento pliiĝas, la flustroj laŭtiĝas... Sed tio okazas sendepende de la realo pri la milito, kiu estas vualita per blindiga tukego.

* * *

Nel Ĉiuj devas koni la veron. En la respublikana Hispanio, krom la nekontesteblaj volontuloj, kies memvolan aliĝon neniu povas diskuti, kiuj venis entuziasme pelitaj de Idealo, spite barojn k malfacilaĵojn sennombrajn, nur batalas sur nia tero homoj, kiuj naskiĝis en nia lando k parolas nian lingvon. Ne ekzistas sur nia teritorio generaloj, kiel von Faupel k Mancini, specialaj senditoj de fremdaj ŝtatestroj. Nur la senhonoraj ribeluloj povas akcepti tiajn mastrojn, sen kiuj ili estus jam de longe venkitaj senrimede de la plenrajta forto de sia propra popolo, de la viva Hispanio!




Niaj fervoraj amikoj el Hago estas bravaj pioniroj de novaj metodoj por praktika apliko de niaj devizoj pri rekta alpaŝo de la popolo en ĉiuj aspektoj de la urĝa antifaŝista batalo. Krom eldono de nia gazeto en nederlanda lingvo, ili ankaŭ pretigis ekspozician fenestron, kiu loge k arte altiras ĉies atenton kiel bone montras la apuda bildo.

# MAHOMETANA DIBOĈA FESTENO

La tuta mondo konas, jam de longe, la procedojn per kiuj la bando da perfidaj ribelintaj generaloj logis la maŭrojn al la infero de la milito en Hispanio. Oni promesis al ili altan salajron, abundan nutraĵon, teron por kulturi ĝin post la venko k, kiel militakiraĵojn, ĉion, kion ili sukcesus rabi en la konkerotaj vilaĝoj.

Ankoraŭ pli. Ilia voluptema temperamento estis ruze vekata per aludoj al la virinoj de nia lando k oni rajtigis la marokanojn por satigi sian malĉastan apetiton sur la malfeliĉulinojn, kiujn ili trafus. Jes, eĉ tiu monstraĵo estis promesita al la maŭroj, por altiri ilin, de la senhontaj armeaĉanoj, kiuj nepre bezonis tiujn hordojn, kiel helpon por starigi la regnon de Dio.

La afrikanoj do, forrabis senbremse vilaĝojn k urbetojn en Ekstremaduro, Andaluzio, Kastiljo, Aragono k Baskio, murdante sendefendajn popolanojn por alproprigi al si kudromaŝinojn, matracojn, vestojn, juvelojn k meblojn. Ĉion ili vendis en la placoj de la vilaĝoj, kun la komplezemo malkuraĝa de la mallojalaj militistoj.

Post la rabado k murdado, la maŭraro dediĉis sin ofendi la virinojn. Tiel okazis en multaj urboj k eĉ en Zaragozo. La faŝistaj radiostacioj dementis tiujn terurajn krimojn k celis kaŝi la hontigan konduton de la oficiroj, kiuj rigardis tion sen ruĝo de honto.

Malfacile estos nun al ili, dementi la barbaran spektaklon, kiu estiĝis en Vitoria, pia urbo plena je monaĥejoj, preĝejoj k loĝata de kristanaj familioj. Personoj ideologie dekstremaj, kiuj forlasis la urbon Vitoria, komunikas la farojn de tiuj barbaroj aĉe agantaj senĝene antaŭ la hispanaj banditoj.

Alvenis tien la maŭraj hordaĉoj, ebriaj je sango, sataj je akiraĵoj, k regataj de freneziga malĉastemo. Tiuj sovaĝaj bestoj, kiujn neniu bremsis, disiĝis tra la urbo k en la ĉirkaŭaĵoj profanis la tremantan k puran honestecon de centoj da virinoj hispanaj. Tiun, kiu rezistis al perfortigo, ili mortigis. La viroj, kiuj volis defendi la virton de fratino, filino, edzino aŭ patrino, falis, traborite de klugoj, sub la facila akuzo je «ruĝulo».

Nun, post monatoj, tiu monstra krimo, tolerata de aŭtoritatoj sin nomantaj hispanaj k kristanaj, fruktiĝas kiel malbeno k hontindaĵo. Jam dek unu el tiuj knabinoj, perfortigitaj sen la protekto de la hundaĉoj de «Supren Hispanio», akuŝis nigrajn idojn, kiel ateston nekontesteblan pri tio, kiaj estas la naskintoj. Pli ol kvindek virinoj baldaŭ akuŝos siavice k ĉiu el ili scias, ke baraktas en sia ventro la frukto de tiu maroka aĉularo, kiun Franko k liaj kunuloj venigis en Hispanion, por masakri niajn infanojn k malvirgigi niajn virinojn.

Kiam ne eblos nei la faktojn, tiu hundo naŭziga, kiun la Papo ĵus agnoskis, Franko, diros, ke ĉio estis tolerata por plifortigi la solidarecajn ligilojn kun siaj aliancanoj de Afriko... je nomo de la kristana familio!

**Esperanto estas, krom instrumento de kulturo, advokato de popoloj!**

# MOZAIKO

● La pirata krozŝipo «Almirante Cervera» atakis la anglan ŝipon «Mac Gregor» kiam ĝi eliris el haveno de Santander kun 1.500 virinoj k infanoj, kiuj forlasis la danĝeran zonon.

Sen komentarioj...

● Laŭ angla gazeto *Daily Herald* Franko sekrete komunikis, ke li estas preta rompi kun Berlino k Romo, k forsendi la germanajn k italajn trupojn, sub jenaj kondiĉoj: Subteno de la Ne-Interveno tiamaniere ke Francio k Sovetio ne helpu la respublikan registaron. Li ricevos militrajton k samajn konsiderojn ol la respublikanoj; k se li gajnas la militon, oni agnoskos lin kiel estron de Hispanio k oni helpos lin finance rekonstrui la landon.

Ni ne scias ĉu tio entenas iom da vero aŭ estas simple ke li provas forpeli la «mastrojn»...

● La 1. de Aŭgusto alvenis en Santander 72 soldatoj, kiuj forkuris el faŝista armeo k petis batali en niaj trupoj. Jen veraj volontuloj, kiuj per sia foriro elpruvas la veran situacion de faŝista zono.

● Angla gazeto *The Times* publikigis la 2. Aŭgusto raporton pri parolado prononcita de angla deputito Sir Stattford Cripps en Islington. Li diris: «la ŝiparo de Franko nur estas pirata ŝiparo. En la feliĉaj tagoj de Palmerston ili estus severe punitaj fare de la anglaj militŝipoj».

● Jam aperas en nia milito signoj de faŝista malespero. La soldatoj kaptitaj en nia atako al pozicio el sektoro de Huesca estas preskaŭ ĉiuj italaj k iliaj kartoĉujoj aperas plenplenaj de kugloj «dum-dum». Niaj vunditoj ja montras la kruelan efikon de tiaj kugloj. Tion povis libere konstati kelkaj fremdaj gazetistoj, kiuj vizitis tiun fronton.

● Laŭ tre fidindaj sciigoj, ankoraŭ persistas certaj konversacioj inter Italio k Franko rilate al maroka fermineralo. Ĝis nun tiu mineralo estis vendita al Germanio, Anglio, Polio k Ĉeĥoslovakio, sed la sendoj al Polio k Ĉeĥoslovakio estas subite interrompitaj. Nun oni sendas al Germanio, Anglio k Italio, sed ĉi lasta lando pretendas pliigon al tiuj sendoj, malgraŭ la rezisto de Germanio, kiu deziras akapari la tutan produktadon.

Kiel oni povas konjekti, la firmeco de l'akso Romo-Berlino estas... fera.

● Nia armeo batalas k studas. En la tranĉeoj k parapetoj la Milicoj de la Kulturo starigis lernejojn, kie oni instruas la soldatojn dum ripozo. En fronto de Teruel funkcias 30; en fronto de Huesca 60; en fronto de Granada 100; en fronto de Kordobo 50; en fronto de Zaragoza 15; en fronto de Guadalajara 40; en fronto de Toledo 34 k aliaj en hospitaloj, aviadkampoj k. t. p.

● Okaze de lastaj luktoj en Madrida fronto, la ribelintoj intense mobilizis la fortojn por rezisti nian ofensivon. Unu el la vagonaroj, kiu transportis trupojn estis kondukata de maŝinisto ĵus elirinta el malliberejo, kie li estis akuzita kiel maldekstrulo. Kiam la vagonaro estis tuj alvenanta en stacio de Caceres, la maŝinisto akcelis la marŝon k la vagonaro eniris kun ega rapido k ektuŝegis alian vagonaron, kiu atendis eblan eliron. Okazis grava katastrofo, kies unua viktimo estis la maŝinisto mem. La du vagonaroj restis plene detruitaj. Jen pruvo pri anonima heroeco de hispana popolo.

● En faŝista zono mortis kardinalo Ilundain. La destino punas ĉiujn estrojn de la ribelo. Ni deziras morton al neniu, sed ni suspektas ke la providenco dekretis la malaperon de ĉiuj faŝistaj tiranoj.

● La agentejo *United Press* anoncis, ke el ĉiuj eŭropaj potencoj, kiuj akceptis pagi la elspezojn de la Londona Komitato, nur Anglio pagis sian kotizon. Pro tiu raporto, kelkaj potencoj pagis tuj, sed oni deklaris, ke la Komitato ne havas ankoraŭ sufiĉe da mono por pagi la tutajn elspezojn. La kadavroj ne bezonas poŝon!

● La korespondanto en Gibraltaro de angla gazeto *Daily Herald* anoncas, ke grupo da germanaj soldatoj atakis la filion de Banko de Hispanio en Algeciras, kaptis la tutan arĝenton k tuj foriris rapide per blenditaj aŭtomobiloj, malgraŭ la protestoj de «naciistaj» soldatoj, kiuj deĵoris tie k kiuj estis enkarcerigitaj.

● Dum lastaj tagoj la atencoj de la faŝistoj al diverslandaj ŝipoj plinombriĝis. La plej gravaj el ili estas la atako al angla ŝipo *British Corporal,* al franca ŝipo *Marechal Lyautey* k al jugoslava ŝipo *Planik.*

Aliflanke la itala eskadro iniciatis senĉesajn atakojn al hispanaj ŝipoj, ne nur apud niaj marbordoj, sed eĉ en turkaj maroj. Dume, la «Reĝino de l' maroj» meditas...

● La 12. Aŭgusto, la dana ŝipo *Edith* estis atakata de faŝistaj aeroplanoj, kiuj dronigis la ŝipon. La ŝipo estis kontrolata de franca observanto de la Londona Komitato, kiu malgraŭ sia aŭtoritato estis devigata ielsin savi

● La italaj gazetoj jam parolas tute senkaŝe pri la agoj de italaj trupoj en Hispanio, sed malgraŭ tio Italio oficiale ne-intervenas. Ja la gazeto *Popolo d' Italia* diras: «La atako al nordaj pozicioj estas farita de la legiaj divizioj «Nigraj Flamoj» (ĉio estas nigra en faŝista Italio). La divizio «23 de Marto» batalis ĉe la maldekstra flanko». La gazeto *Stampa* diras: «La atako kontraŭ Santander estas farita de la batalionoj 735, 724, 740, 751, 738 k 734. Jen bona cifera parado!

● Laŭ la korespondanto de angla gazeto *News Chronicle* generalo Kejpo de Llano, dum radioparolado, akuzis la estrojn de faŝista partio pri malmorala konduto rilate al virinoj. Tion konfirmas la fakto ke dum lastaj semajnoj multaj virinoj fuĝis el nigra zono.

● Laŭ rektaj sciigoj el Hirsberg, Silezio, (Germanio) la rekrutoficejo Wehrmeldeart sendis al ĉiuj fraŭloj inviton subskribi dokumenton akceptante iri al Hispanio kiel «volontuloj».

● La germanaj aŭtoritatoj dekretis la disigon de organizo de katolika junularo *Neudeutschland,* k de ĉiuj asocioj kiuj estas internaciaj. Tiu estas la vojo de l' progreso...

● La angla Komitato pri Kuracista Helpo al Hispanio anoncas, ke la 25. Aŭgusto eliris en vojaĝo al Hispanio kvar novaj ambulancoj. Ili ne surportos signojn de Ruĝa Kruco por eviti ke la ribelintoj bombardu ilin, kiel okazis al antaŭaj sanitaraj veturiloj.

## TAMEN, LA KADAVROJ EL KORDOBO ANKORAŬ SILENTAS...

Ni ja komprenas la klopodojn de kelkaj gvidantoj de la neŭtrala movado penante mildigi la amaran pilolon pri la terura buĉado, fare de la faŝistoj, al la esperantistoj de Kordobo. *Heroldo de Esperanto* en sia lasta numero de Julio, svingas, kun nekaŝebla ĝuo, la ricevon de letero en Esperanto—kun hispanlingva traduko, pro cenzuraj postuloj—kiun sendis infanteriano el suda faŝista armeo. Laŭ la estimataj redaktoroj de «*H. de E.*» por detrui la asertojn pri mortigo de esperantistoj, sub regado de Franko, sufiĉas tiu naiva letereto, kiu cetere promesas floradon de la Esperanto-movado post la venko (!) de la «naciista» perfida ribelo.

Ni ne povas mezuri la longon de la politika influo de tiu malamika «samideana» soldato farinta tiun fanfaronan promeson. Ni ne povas grumbli pri la facila entuziasmeto de nia veterana kolego antaŭ la supozo ke la hispana Faŝismo dorlotos la verdan stelon. Ni ne povas eviti ke reakciaj katolikaj esperantistoj faru bruon pro tio, ĉe sia sonorilejo, dum fulmotondre ili ekskomunikas nin pro fervora apliko de nia lingvo je la servo de ĉies libero. Ni ne volas detrui per vortoj la ĥimeron pri harmonio inter progreso k regreso. Ni estas praktikaj homoj! Jen, ni invitas la samideanojn, el la neŭtrala movado, konstati mem, per freŝaperinta jarlibro de I. E. L., ke vakas mute la nomoj de malnovaj k tre konataj delegitoj en klasikaj hispanaj esperantistaj lokoj, kie bedaŭrinde la Faŝismo regas. Jes! en neŭtrala jarlibro—ne klasbatala gvidilo—nur aperas normale la ordinaraj delegitoj loĝantaj en urboj de la Respubliko!

Ĉu valoras torditaj promesoj, antaŭ la pezo de konkretaj faktoj, pri la sorto de Esperanto, sub la signo de jugo k sagoj? La faŝista anonima «samideano» devas sukcesi unue, por konvinki nin pli efike, paroligi la kadavrojn el Kordobo, kiuj obstine ankoraŭ silentas...

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

| ĜENERALA INTERNACIA ADRESO nur por mono | NEDERLANDA ADRESO nur por mono de holandanoj |
|---|---|
| GUSTAVE FARENC | PETRO van der PLANK |
| 53, Rue Brise-Pain | Van Speijkstraat, 48-I |
| Poŝtĉekkonto 13944 Orleans | poŝtĝiro 245542 |
| ORLEANS (Loiret) FRANCIO | AMSTERDAM W. Nederlando |

ANGLIO.—K-do O. MELTON.—23 Fowler Str. Nechells, BIRMINGHAM 7

SVEDIO.—ARBETAR ESPERANTISTEN.—Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.,
Poŝtĝiro n.° 53411, STOCKHOLM

BELGIO. — K-do M. DELFORGE. — 33, Rue de Heigne,
Poŝtĝiro 199106, CHARLEROI

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro. . . | 56'10 | ptoj. |
| J. E.—Paterna. . . . . . | 10 | » |
| Paco k Amo—Barcelono. . | 16'50 | » |
| J. R.—Puigcerdá. . . . . | 12 | » |
| R. A.—Cocentaina.. . . . | 4 | » |
| V. R.—Soneja. . . . . | 5 | » |
| J. G. S.—Soneja. . . . . | 5 | » |
| R. P.—Castellón. . . . . | 5 | » |
| M. R.- Bugarra.. . . . . | 2'50 | » |
| A. M.—Bugarra.. . . . . | 2'50 | » |
| P. S.—Orihuela. . . . . | 6 | » |
| R. B.—Ademuz. . . . . . | 25 | » |
| M. D.—Villanueva Serena. . | 20 | » |
| W. N.—Oulu.. . . . . . | 50 | f.mk. |
| V. M.—Detroit. . . . . . | 3 | dol. |
| F. V.—Dobra u Fridru. . . | 38 76 | ffr. |
| G. Esperantiste Ouvrier.— Orleans. . . . . . . . | 17 | » |
| FET-anoj.—Toulouse. . . | 27 | » |
| Th.—Squiffiec. . . . . . | 10 | » |
| L. G.—Plounevez Quintin. . | 5 | » |
| S. G.—Kergrist Moelore.. . | 5 | » |
| B.—Annecy. . . . . . . | 50 | » |
| B. S.—Atirdarberg. . . . | 15 | sv.kr. |
| H. L.- Sundsvall. . . . . | 5 | » |
| G. E.- Leksand. . . . . | 5 | » |
| A T. Umea . . . . . . | 3 | » |
| J. K —Vesterhaninge.. . . | 2 | » |
| E. E.—Stockolm. . . . . | 5 | » |
| Lab. Esp. Klubo.—Malmo. . | 6 | » |
| G. Y.—Stockholm.. . . . | 5 | » |
| C.—Port Said. . . . . . | 5 | ŝil. |
| E. L. J.—London. . . . . | 5 | » |
| W. G. B.—Nelson.. . . . | 0 6 | » |
| P. G.- West Hartlepool.. . | 1 | » |
| M. S. -Torquay. . . . . | 2 | » |
| E. J W.—Stanmore. . . . | 4 | » |
| F. Folkestone.. . . . . | 2.6 | » |
| C. W. R.—Long Eaton. . . | 2,6 | » |
| R. S.—Letchworth.. . . . | 3 | » |
| J. S.—Harpenden. . . . . | 1 | » |
| W. S.—Nelson. . . . . . | 2 | » |
| N.—Birmingham. . . . . | 2 6 | » |
| J. W. D.—Bayswater.. . . | 5 3 | » |
| A. L.- Huy. . . . . . . | 10 | b.fr. |
| A. Z.- Jumet.. . . . . . | 50 | » |
| J. W.- Dison . . . . . . | 10 | » |
| FET-grupo.- Bruxelles. . . | 75 | » |
| FET-grupo.—Liege. . . . | 20 | » |
| C. J. B. - Apeldoorn. . . . | 0'50 | gd. |
| W. H. v D —Hilversum. . . | 2 | » |
| J. B.—Amsterdam.. . . . | 1 | » |
| FLE-Sekcio—Heerlen. . . | 3 | » |
| FLE.-5. Sekcio Amsterdam. | 6'50 | » |
| J K.—Bargermeer. . . . | 0 50 | gd. |
| J. P.—Breezand.. . . . . | 10 | » |
| G. W. - den Haag. . . . . | 1 | » |
| S. M.—Veenworden. . . . | 1 | » |
| FLE-Sekcio 13.-Amsterdam. | 3 | » |
| G. J. W.—den Haag. . . . | 1 | » |
| J. J.—Rotterdam. . . . . | 1'50 | » |
| N.—Arnhem. . . . . . . | 1'75 | » |
| A. W.—den Haag . . . . | 1 | » |
| K. L.—Opsund. . . . . . | 1 | » |
| P. v. M.—Zandam.. . . . | 1 | » |
| Poŝtesp.. - Rotterdam. . . | 2'50 | » |
| FLE-Sekcio.—Krimpen. . . | 13'20 | » |
| FLE-Sekcio 2.—Rotterdam . | 5 | » |
| A. C. H.—Rotterdam.. . . | 1 | » |

## KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

NEDERLANDO. K-do. J. W. Teune, Yselstrat, 97, Zuid, Amsterdam, deziras korespondi kun hispano.

KORESPONDA CENTRO INTERNACIA havigas ĉiaspecajn adresojn pri ĉiuj temoj kaj ĉiuj landoj. Petu detalojn: 2e Helmerstraat 22, Amsterdamo.

ROTERDAMO. 17 jara spicisto dez. kor. k. ĉ. l. p ĉ. t. Nepra respondo. Adreso: Aart de Bes.-Paulkrugerstraat, 21, 6/. -Rotterdam Z

## LASTA HORO

Paralele kun la faŝista atako en la nordo, kie oni brave disputas la terenon al la invadintoj, en la aragonaj frontoj, la Popola Armeo unuan fojon entreprenas plensukcese vastan ofensivon, kiu estas rekta minaco por la gravaj faŝistaj urboj de tiu regiono. Ankaŭ en la sudo pliboniĝas strategie multaj pozicioj.

En la internacia fronto, la senhonta itala piratado devigas malfermi okulojn al kelkaj ministroj. Francio aŭdas jam, en sia ventro, obtuzan muĝadon. La Ligo de Nacioj denove baldaŭ kunvenos... sen bruo.

## POPOLFRONTA LETERUJO

Ĉ. H.—Shanghai—Notita la enhavo de via estimata letero. Ni plenumas viajn mendojn k dankas vin pro la kantokolektoj, kiuj bone alvenis. Fratan batalsaluton! Venkon al vi, kamaradoj!

H. N.—Malmo.—Via unua monsendo estas kvitancita en nia 18-a numero. Lastan sumon ni kvitancas. Ni kordankas vin k ĉiujn amikojn de via urbo.

H. K.-Kuŝiro.—Ni notas la enhavon de via estimata letero k plenumos viajn dezirojn, sed ni multe timas, ke la sendaĵoj ne trafu vin, ĉar «P. F.» estas malpermesita en Japanio k via Poŝto rifuzas nian gazeton.

N. S. P.—Naĥtaĥe—Via skribaĵo «Demandoj» ne taŭgas por «P. F.» kiu ne estas tendenca gazeto. Sekve ni sendas ĝin, tradukita, al Madrido laŭ via peto. Via tre bona, sed iom longa poemo, ne estas pro tio profitebla sed ni :klopodos komplezi vin.

J. B.—Rotterdam—Via estimata longa letero meritas aparte privatan respondon k vi certe ricevos ĝin, rekte, per poŝto.

J. B.—Londono — Kun intereso ni legas ĉiam viajn tre estimatajn skribaĵojn. Nun ni vidas, ke vi apogas k pravigas nin rilate la sintenon de absurdaj idealistoj, kiuj kontraŭstaras la ageman faŝismon per «aktiva» nenionfarado, dum praktika laboro urĝas! Koran saluton!

K. K. -Nynashamn—Estas tre facile, kamarado, erare opinii je longa distanco, ĉefe se oni ricevas malĝustan impreson. Ni dezirus esti rigardataj per okulvitroj ne kolorigitaj per antaŭjuĝoj partiecaj.

F. R. — Aussig — Notinte viajn indikojn; viaj instrukcioj estos plenumataj. Tamen ni sendos al via Asocio du ekzemplerojn de ĉiu numero.

N. A. MacQ.—Ann Arbor, Michigan—Via belega letero tre ĝojigis nin. Vi estas homo, kiu agnoskas la veron k la pravon ekzamenante la faktojn. Saluton!

J W.—Morlaix—Estu singarda, kamarado! Nia malamikaro estas ruza k lerta. Nun temas pri disvastigo de mensogoj por dividi la laboristaron en eksterlando k suspektigi ĝin pri nia afero. La faŝismo entreprenas nun vastegan ofensivon laŭ tiuj procedoj. Fidu al la hispanaj laboristoj! La Internacia Brigado daŭre ekzistas.

V. M.—Detroit—Nin trafis via letero, kiun ni tutkore dankas, ĉefe pro viaj kuraĝigaj k entuziasmaj vortoj.

L. A.— Minneapolis — Ni respondas vian karton. ` ian monsendon ni jam kvitancis. Ni alsendos la gazeton laŭ viaj indikoj. Pro nuna situacio, korespondado estas malfacila. Tamen, ni klopodos komplezi vin.

G. P. — Sgag Point - (N. Z.) — Daŭre ni sendos al vi nian gazeton. Vian bondeziron ni estimas kun danko.

K-do C. – Plouguerneau — Ni bedaŭras, ke ni ne sukcesis komprenigi al vi nian starpunkton per la koncerna artikolo. Ni citis nur faktojn, kiujn ni bone konas k petis niajn legantojn ne juĝi la aferon kiel persekuton al senkulpuloj, sed ke ili atendu la rezulton de la juĝlaboro. Ni diris, ke ni ne kredas, ke ĉiuj sampartianoj, eĉ ne ĉiuj gvidantoj de tiu organizo, estas malhonestaj sed necesas konstatigi, ke la polico ne faris arestojn kaprice. Rilate al la du aliaj organizoj, kiujn vi mencias ni koincidas kun via opinio. Ne facilanime englutu tendencajn informojn. La registaro agas tute lojale por ĉiuj laboristoj senescepte. Akcepti la malon, estas rezulto de misinformado. Pensu, ke ekzistas elementoj, kiuj malrekte ekspluatas sentojn de homeco por sia disiga celo.

R. R. B. - (L. E. A.) - New York — Ĉion ni notis dece el via letero k antaŭdankas vin pro la promesitaj lernolibroj.

J. O. — Fiscal — Via bela artikoleto certe aperos, kiam eble plej baldaŭ, Ni dankas vin!

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia